

STARTO

N-ro 1/2006 (218)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



La eldonisto Petr Chrdle prezentas ambaŭ volumojn de "Esperanto pro děti" fare de Jana Melichárková (meze) ilustritaj de Mirka Tomečková (dekstre) enkadre de "Libraj ĵaŭdoj" en la koncertejo "Spegula kapelo" de Klementinum en Prago. *Foto Miloš Bloudek.*

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 10 eŭroj (+ 3 eŭroj aerpoŝte),

rete Starto: malovec@volny.cz,

rete ĈEA:

cea.polnicky@quick.cz (sekretario)

melicharkova@quick.cz (prezidanto)

www.esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, D 500 Kč, Z 1000 Kč, Starto-abono 200 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz

Libroservo: c/o Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

GRAVA INFORMO!!!

NOVA BANKO-KONTO de ĈEA:

195 230 825 / 0300

Poŝtovní spořitelna Poděbrady

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz (reprezentace ĈES, koordinace, vnitřní vztahy, metodika)

Vicprezidanto (komitatano A de UEA): Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinárodní vztahy, odborná aplikace esperanta, vydavatelská činnost, EU, retkomunikoj)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (muzeum)

Sekretario: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz (sekretariát, členská základna, účetnictví)

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz

Komitatano: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (kluby, konference, zápisy, čestní členové)

Komitatano: Miroslav Vaněk, 507 44 Libošovice 104, vanekmi@centrum.cz, (sekce, komise)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828

Kontrolgrupo de ĈEA: Prezidanto: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef-hron@volny.cz, tel. 466 401 942;

Věra Štěpánová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., slaharova.v@kr-ustecky.cz;

Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@pcp.lf3.cuni.cz

Redakto de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz, malovec@chello.cz

Kontrollegis: P. Polnický, V. Kočvara, M. Pastrňák

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Kolorodov 1538, 738 01 Frýdek-Místek,

jarkacejkova@centrum.cz

NOVJARA MESAĜO DE LA UEA-PREZIDANTO

Karaj esperantistoj,

ĉi tiu rito de nov-jaraj salutoj kiel ĉiuj ritoj havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. La avantaĝo estas, ke ĝi estas io konata kaj donanta certecon. Nenio esence nova aŭ revolucia povas esti en nov-jara saluto. La malavantaĝo estas, ke nenio nova aŭ revolucia esence estas en nov-jara saluto.

Ni provu kunmeti avantaĝojn kaj malavantaĝojn kaj diri ion tre malnovan, kio, tamen, por kelkaj novaj esperantistoj ŝajnos revolucie nova.

Kial ni estas membroj de UEA? Kial ni estas esperantistoj entute? La unua tago de la jaro estas la ĝusta tago por demandi sin pri tio. La ĉefa fonto, al kiu ni devas reiri, estas la Statuto de UEA, kaj ni devas legi kune la celojn, kiujn UEA (kaj ni, aliĝintoj al ĝi) deklaras realigindaj.

La artikolo 3-a de la Statuto marmore firme tekstas:

"La celoj de UEA estas: (a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto; (b) agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon; (c)

plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo; (ĉ) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

Alivorte ni estas kune en UEA unuavice por disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto. Tio estas la unua celo, kiun la redaktintoj de la Statuto metis en la komenco, do, verŝajne ĝi estas la plej grava. Temas pri celo rekta kaj klara kaj desubisma, alivorte, kiu postulas konvinki ĉiam pli grandan nombron da normalaj homoj lerni Esperanton kaj uzi ĝin. Ne estas multo dirinda pri ĉi tiu celo. Simple ni memoru, kiu estas nia vera tasko kaj ni demandu nin, kial la laborplano de UEA tiom insistas pri informado kaj instruado, dum multaj el ni trovas, ke turismo kaj Pasporta Servo estas tre pli allogaj okupoj, por ne paroli pri verkado de poemoj je la sun-subiro.

Bonvolu atenti: mi ne estas diranta, ke oni ne verku poemojn, dum la suno subiras, aŭ ke oni ne turismu, kiam oni povas. Mi nur estas diranta: ni ne miksu celojn kaj ne ŝanĝu la rang-ordon de la Statutaj celoj. Kiam mi parolas pri UEA, evidente mi parolas ankaŭ pri ties eroj, inkluzive de la landaj asocioj

kaj lokaj kluboj. La ĉefa celo de la Esperanto-klubo de Palestrino (la urbo, en kiu mi vivas) ne povas esti nur konigi Palestrinon kaj ties mirindan historion kaj kulturon tra la mondo. Tio estas la dua celo. La unua estas disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto en Palestrino mem. Se mi, membro de la Esperanto-klubo de Palestrino, ne sukcesas (aŭ eble eĉ ne provas) konvinki la lokan lernejestron starigi kurson pri Esperanto en Palestrino, mi ne devus lamenti, ke ILEI ne sukcesas konvinki UN-on instrui Esperanton en ĉiuj lernejoj de la mondo aŭ almenaŭ de EU-landoj.

Due venas la celo utiligi Esperanton por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj por faciligi la internacian komunikadon. Tio signifas, laŭ la Statuta ĵargono, prezenti Esperanton al ĉiuj internaciaj organizaĵoj, UN, Unesko, Eŭropa Unio, Organizaĵo por Afrika Unuiĝo, ktp. kaj peti ilin agnoski ĝin kiel rimedon por justa internacia komunikado. Ankaŭ ĉi tiu celo rilatas al la ekstero. Oni rajtas havi malsamajn ideojn pri la utileco de tiu agado, sed certe ĝi estas agado ne nur farinda sed farenda. Mi mem havas la impreson, ke ni sukcesas fari pli malmulte, ol ni devus. Ankaŭ ĉi-rilate eble estas sintrompo. Oni

pensas, ke la agado ĉe Unesko estas agado farata en Parizo kaj la agado ĉe la instancoj de Eŭropa Unio estas agado farata en Bruselo. Tio estas vera nur ĝis iu tre malgranda punkto. La ĉefa agado ĉe Unesko aŭ ĉe EU estas farata lande kaj loke. Se en Kipro ne estas eĉ unu esperantisto, estas tute vane alparoli la kiprajn parlamentanojn en Bruselo aŭ Strasburgo aŭ la kipran delegitaron ĉe Unesko. Se la landaj asocioj en kelkaj EU-landoj okupiĝas pri ĉio, krom pri alparolado de siaj naciaj eŭropaj parlamentanoj, nenio estas atingebla en Bruselo.

La tria kaj kvara celoj, finfine, venas al individuoj kaj al ilia feliĉa rilatado trans diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo kaj akirado de fortika sento de solidareco inter la membroj de UEA kaj al disvolvo ĉe ili de kompreno kaj estimo por aliaj popoloj.

Efektive kiam temas almenaŭ pri la membroj de UEA, mi kredas, ke tiujn celojn ni konscie provas realigi per la konataj iloj. UEA eldonas revuo(j)n vaste legata(j)n tra la mondo, funkciigas la plej grandan libroservon, aranĝas la ĉiujarajn Universalajn Kongresojn, rilatas papere aŭ rete kun proksimume ĉiuj esperantistoj tra la mondo.

La sukcesa realigo de ĉi tiuj lastaj celoj, tamen, ne povas kontentigi nin, ĉar ni ja devas realigi ankaŭ (ĉu ĉefe?) la unuan kaj la duan. Ni ĉiam rediras al ni mem, ke la mondo nun estas pli malfacila, ol ĝi estis en la tempoj de Zamenhof, ke nun ni estas regataj de tutmondaj senkoraj mastroj profit-amaj, sed ĉu vere estas tiel? Eble ne, eble Zamenhof kaj liaj samtempuloj nur estis pli kuraĝaj ol ni kaj kuraĝis batali kontraŭ la caroj kaj la aliaj perfortaj reĝimoj de tiu tempo. Kaj kiel sufiĉe laŭdi la postajn generaciojn, kiuj sukcesis porti Esperanton tra kruelaj mondmilitoj en Eŭropo kaj ekster Eŭropo?

Eble simple ni devas sekvi ilian ekzemplon kaj ĉesi kvereli kaj disputi inter ni pri malgrandaĵoj, kiuj havas neniun rilaton al niaj unua kaj dua celoj, kaj kuraĝe rilati al la neesperantistoj.

Oni demandas min ofte: "Kiuj estas la nunaj defioj antaŭ la Esperantomovado?" Mi ofte respondas: "La kutimaj". Ili estas esence du.

Unuflanke ni devas konvinkiĝi, ke ni ne faras ion facile fareblan, ĉar ni volas plibonigi la mondon. En nia malgranda kampo, per niaj tute etaj fortoj, sed ja ni volas plibonigi la mondon kaj tion ni povos fari nur forprenante iom da privilegioj de tiuj, kiuj nun havas ilin.

Poste ni devas konvinkiĝi agi ekvilibre kaj tolereme. Ni bezonas ĉiajn agadojn: desubajn [informado kaj instruado al normalaj homoj], desuprajn [informado kaj traktado kun politikistoj kaj internaciaj instancoj] kaj deflankajn [sciencaj studoj por apogi la aliajn agadojn]. Neniu havas la ŝlosilon por la vero aŭ por la sola ebla maniero triumfigi Esperanton. Do, ni faru ĉion ekvilibre. Individuo rajtas pasie interesiĝi nur pri unu agadspeco, sed organizaĵoj (de la loka grupo supren) ne.

Tiu ekvilibro estas postulata ankaŭ inter agado en Eŭropo (la tradicia) kaj agado ekster Eŭropo. Estas klare, ke en la nuna momento multe pli da homoj volas lerni Esperanton en suda Barato, ol en norda Svedujo. Ni alfrontu ekvilibre la situacion!

Do, ni estas antaŭ nova jaro de laboro. Ni alfrontu ĝin per certeco, ke el laboro venas rezultoj. La agado en la pasintaj jaroj diras al ni tion. Se ni investis laboron en Kabulo, esperantistoj komencis aperi en Kabulo. Se ni ne investis laboron en Etiopujo, esperantistoj ne ekestis en Etiopujo. La afero estas tiel simpla. Al ĉiuj bonan laboron kaj grandan ekvilibron en la laboro!

Renato Corsetti

La angla lingvo iĝas minaco por Britio

Marek Blahuš

La tutmonda superregado de la angla lingvo, de kiu la anglalingvaj landoj inkluzive de Britio profitis dum la pasinta jarcento, hodiaŭ fariĝas serioza danĝero por la internacia pozicio de la Unuiĝinta Reĝlando. "La plej bona defendo de la Unuiĝinta Reĝlando kontraŭ la minaco de la disvastiĝo de la angla estas, fakte, lerni aliajn lingvojn." Tio ĉi ne estas citaĵo de iu nekonata brita Esperanto-aktivulo - tion asertas nova raporto de la Brita Konsilio, publikigita merkrede, la 15-an de februaro.



La raporto aperinta sub titolo *The latest threat to the UK...The English Language* ("La plej lasta minaco por la Unuiĝinta Reĝlando... La Angla Lingvo") baziĝas sur esploro de David Graddol, nomita *English Next* ("Angla estonteco").

David Graddol estas brita lingvisto, partopreninto de la lasta Nitobe-sim-

pozio en Vilno kaj membro de la redakta komitato de la revuo *Language Problems & Language Planning*. Ĉi tiun revuon, "Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado", publikigas la prestiĝa eldonkompanio John Benjamins, kunlabore kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, organizo fondita en 1952 kadre de Universala Esperanto-Asocio.

En sia nova esploro Graddol konstatas, ke dum la nombro de homoj kapablaj paroli la anglan proksimiĝas al du miliardoj, rapide malaperas tiu avantaĝo, de kiu antaŭe la britaj civitanoj pro la angla kiel sia ŝtata lingvo profitis. La unulingvaj britaj studentoj povas atendi malhelan estontecon, diras la raporto, ĉar la trejnataj plurlingvaj junuloj el aliaj landoj posedas konkurencajn avantaĝojn super siaj britaj kolegoj en tutmondaj kompanioj kaj organizoj.

John Whitehead de la Brita Konsilio diras, ke estas "absolute esence, ke la britaj infanoj lernu aliajn lingvojn". Aldone al tio, Graddol en sia esploro atentigas, ke la elekton de tiuj lingvoj oni devas atenteme pripensi, kaj poste proponas kelkajn konkretajn lingvojn - la britaj infanoj lernu la hispanan, la mandarenan kaj la araban. La rolon de la franca kiel internacia lingvo la raporto trovas malgrandiĝanta. Ankaŭ rimarkinde estas, ke kiel verŝajnan signifan helpon en la procedo de plurlingviĝo oni mencias la etnajn minoritatojn de Britio.

La ĉefa kialo por la perdiĝado de la avantaĝo de la britoj laŭ Graddol estas la fakto, ke en la mondo hodiaŭ ekzistas jam tre multe da junaj homoj, kiuj perfekte regas la anglan kaj aldone al ĝi ĉiam minimume unu kroman lingvon. Kiel kialon de la grandega kresko de populareco de la angla dum la lastaj jaroj li en sia verko prezentas la fakton, ke en multaj landoj, inkluzive de Ĉinio kaj Barato, ĝi ne plu estas instruata kiel vera fremda lingvo.

La angla tie laŭ li rapide fariĝas io alia, nome "preskaŭ universala baza kapablo". Statistikoj montras, ke preskaŭ 60% de ĉinaj bazlernejoj nun lernas la anglan. Krome, la suma nombro de parolantoj de la angla en Barato kaj Ĉinio – 500 milionoj – nun superas la nombron de parolantoj alie en la mondo.

Fine la raporto de la Brita Konsilio konkludas, ke tiu ĉi esploro estas alvoko ekagi por tuta Britio kaj rememorigas pri la jam komencitaj projektoj pri instruado de fremdlingvoj en la britaj lernejoj, kiuj celas, ke oni povu eviti la malhelan estontecon profetatan de Graddol. Temas ĉefe pri la eksperimenta instruado de la mandarena en kelkaj lernejoj kaj pri pioniraj projektoj de lingvaj interŝanĝoj de studentoj kaj instruistoj ene de Eŭropo kaj en la araba mondo kaj ankaŭ en pli malproksimaj landoj kiel Rusio, Japanio kaj la landoj de Suda Ameriko.

Por esperantistoj tiu ĉi raporto

sendube estas tre grava, kaj ne nur ĉar ĝia iniciatinto estas homo iel ligita al la eksterpublika agado de la Esperanto-movado. Post la unua raporto de la Eŭropa Komisiono pri multlingveco, kiu aperis pasintjare fine de novembro kaj klare asertis ke "la angla ne sufiĉas", la raporto de la Brita Konsilio fariĝas plia indikilo pri la fakto, ke la gravaj internaciaj asocioj nuntempe ekkonscias pri la neeltenebleco de la situacio, kiam en grupo de pluraj samrangaj ŝtatoj oni interkompreniĝas sole per la lingvo de unu el ili.

En la mondo, en kiu eĉ la ĉefa organizo, kies baza celo estas "antaŭenigi la anglan lingvon kaj la kulturon de Britio eksterlande", jam agnoskas, ke la angla ne povas esti la sola internacia komunikilo kaj instigas al plurlingvismo, ne plu estas loko por elturniĝoj kiel "la angla jam venkis, kial mi lernu aliajn lingvojn?". Ŝajnas, ke la karuselo nuntempe ektorniĝas unu paŝon pluen kaj ke alia, ĝis nun ne tiom signifa lingvo, kiel ekzemple iu el tiuj menciitaj en la raporto, povos baldaŭ fariĝi la angla de la estonteco.

Povas esti, ke nuntempe oni jam travivas komencon de tia periodo, dum kiu speciale senteble montriĝados la efemereco de monda hegemonio de unu nacia lingvo. Estus saĝe, se la esperantistoj klopodus nun profiti de tiu situacio kaj sukcesus proponi sian solvon, prefere ol nur atendi ĝis ekregos la mondon, dum la sekva epoko, alia nacia lingvo – kiun poste alterne anstataŭos iu alia.

Prelego en Vilno

El la Nitobe-simpozio

Karaj gesamideanoj,

mi estas honorita, ke mi estis invitita al tiu ĉi evento, kaj permesu, ke mi ankaŭ diru kelkajn vortojn en Esperanto. Je la komenco mi volus diri, ke mi subtenas la ideon de unu oficiala lingvo por Eŭropo. Kaj samtempe mi estas konvinkita, ke tio devas esti lingvo neŭtrala. Hodiaŭ ni estas en la situacio, kiam la angla lingvo servas tiun celon, sed neniuj povas diri, ke tiu situacio estas ideala. De mia sperto en politiko kaj diplomacio mi kuraĝas aserti, ke dank' al la hodiaŭa stato, anglosaksoj kaj loĝantoj de landoj, kie oni komunikas angle, havas naturan avantaĝon kaj okupas ĉefajn poziciojn en diversaj internaciaj organizacioj kaj komitatoj. Tio ne estas, simple kaj angle dirite, *fair*, aŭ justa. Tial mi estis agrable surprizita, kiam mi vidis, dum la Esperanto-kongreso en Adelajdo, Aŭstralio, ke anglosaksoj mem konscias tion kaj multaj ankaŭ subtenas la ideon de neŭtrala internacia lingvo.

Kiam mi revenis hejmen el Aŭstralio, kie mi deĵoris kiel ambasadoro, kaj dank' al la fakto, ke mi konas multajn homojn inter niaj politikistoj, mi tuj komencis viziti ilin kaj peti, ke ili subvenu tiun belegan ideon de interkompreniĝo inter la nacioj, ĉefe en la periodo, kiam Eŭropo plivastiĝas. Sed mi estis iom surprizita, ke neniuj estis ege ema propagi Esperanton. Ŝajnas,

ke post la 40-jara periodo de rusa okupado kaj deviga lernado de rusa lingvo ĉiuj estas kontentaj kun la angla, aŭ parte germana, lingvoj. Eĉ la fakto, ke ekzemple unu triono de elspezoj de Eŭropa parlamento estas konsumita de tradukado, ne gravas. Eĉ ne ilia politika orientiĝo gravas aŭ decidas; en rifuzo de Esperanto ili estas unuiĝintaj, devene de dekstro aŭ maldekstro.

La kaŭzo povas esti jena: antaŭ ne longa tempo mi ricevis ĉeflingvan dokumenton el la jaro 1952. Ĝi estas markita kiel strikte konfidenca kaj en ĝi la Oficejo de Ĉeĥoslovaka ĉefministro skribas al sinjoro Burda el Plzeň, kiu evidente estis kuraĝa homo. La teksto estas tute klara al ĉiuj, kiuj vivis en soveta sistemo (mi citas):

“De la tempo, kiam kamarado Lenin akcentis la signifon de Esperanto por la laborista klaso, pasis tre multa tempo. Intertempe estis konstruita la granda patrujo de socialismo, Soveta Unio, kaj la konstruado de socialismo disvastiĝis al ĉiam pli da landoj, kiuj vidas en Soveta Unio sian modelon kaj abunde ĉerpas el ĝiaj spertoj. El tiu motivo centmiloj da laboristoj en tiuj landoj, eĉ ekster ili, lernas la gepatran lingvon de la pioniroj de socialismo, la rusan. Ĉe tia amasa disvastiĝo de la rusa lingvo malantaŭen iras nature en la fonon la signifo de Esperanto, kiu ĉiukaze estas lingvo artefarita kaj tial eĉ ne estas lingvo en la vera senco de la vorto. Ankaŭ el tiu motivo decidis kamaradoj en la asocio de esperantistoj, ke ili disiru, kaj ili rekomendas ankaŭ al ĉiuj

fabrikaj kluboj, ke ili iom-post-iom likvidu siajn Esperanto-filiojn.

Ni opinias, ke en la nuna tempo efektive multe pli utilas meti tiujn fortojn, organizajn rimedojn kaj energion, kiuj estas dediĉataj al Esperanto, en la servon al plia disvastigo de la scio de la rusa lingvo. Ne temas pri la oficiala malpermeso de Esperanto, kiel vi aludas en via letero. Temas nur pri tio, ke ĉiuj kamaradoj ekkonsciu la ŝanĝiĝintan situacion kaj el ĝi rezultantan malaltiĝon de la signifo de Esperanto.”

Kaj tute kompreneble, klaskonscia Esperanto-rondeto en Plzeň decidis dissendi tiun leteron al ĉiuj E-kluboj en la lando kun rekomendo, ke ili organizu sian agadon tiel, ke ĝi ne efiku kontraŭ la deziro de la Oficejo de la ĉefministro, esprimita en la letero. Esperantistoj el Plzeň finas sian leteron per vortoj: „Ni supozas, ke vi, kiel klaskonsciaj esperantistoj, faros vian propran konkludon kaj organizos vian agadon sen neceso de plua konsilo.”

Kiel oni povas atendi, en la tempo de ŝtata teroro, politikaj procesoj kaj ekzekutoj, ĉiuj ĉeĥaj esperantistoj, kun kelkaj honestaj esceptoj, organizis sian agadon laŭ la konsilo, kio en esenco signifis la finon de Esperantomovado en Ĉeĥoslovakio, iam tute forta*. Nuntempe ĝi bezonus fortegan impulson de ekstere por revivi. Ĝenerale ŝajnas, ke Esperanto estas malfeliĉa de sia naskiĝo, aŭ naskiĝis en la malfeliĉa epoko. Nek Stalin kaj komunistoj, nek Hitler kaj nazioj ŝatis la ideon de la universala lingvo, do

dum la tuta dudeka jarcento ĝi estis subpremita. La eraro ankaŭ certe estis, ke ĝiaj propagandistoj ofte ligadis ĝin kun iu ideologio. Ĝi devus ĉiam resti neŭtrala.

Je la fino mi volus diri, ke plivastiĝo de Eŭropo signifas, laŭ mi, unu el la plej lastaj espero por ĝia savo kaj ankaŭ grandan ŝancon por Eŭropo, kiu, adoptante ĝin, povus samtempe elegante solvi siajn lingvaj kaj kelkajn ekonomiajn problemojn. Krome, tio certe estus ankaŭ granda kontribuo al amikeco inter ĝiaj nacioj. Ankaŭ pro tio ni devus subteni kaj disvastigi tiun ideon. Alian grandan ŝancon por Esperanto mi vidas en sudorienta Azio kaj precipe Ĉinio. Tiu granda lando rapide fariĝas ekonomia supergrandpotenco kaj se ĝi enkondukus Esperanton kiel sian oficialan lingvon, kiel oni de tempo al tempo aŭdas, tio signifus egan instigon kaj por Esperanto kaj ankaŭ por Eŭropo.

Por mi mem mi povas promesi, ke mi ne ĉesos rememorigi al ĉeĥaj politikistoj la ekziston de ilo por interkompreno: antaŭ kelkaj jaroj mi skribis artikolon pri Esperanto kiel lingvo por Eŭropo por la plej konata ĉeĥa reĵurnalo. Mi speciale ŝatis unu respondon de leginto: “La ideo estas tro saĝa por esti adoptita.”

Mi timas, ke li pravis. Homaro, kaj la registaroj speciale, kutime adoptas bonajn solvojn nur, post kiam ili provas ĉion alian.

Jaroslav Suchánek

* Tamen rondetoj kaj junularo aktivis (*red.*).

Raporto Grin

En septembro 2005 aperis franc-lingva raporto **Fremdlingvo-instruado kiel publika politiko** de ekonomo prof. François GRIN el Universitato de Ĝenevo laŭ peto de la Alta Konsilio pri Taksado de la Instrusistemo pri la ebloj de komunikado en EU. La raporto rekomendas Esperanton kiel la plej optimuman solvon. La Esperant-lingva traduko de preskaŭ 100-paĝa libro troviĝas ĉe <http://www.tejo.org/uea/Grin>.

Ni povas ĝin nur koncize priskribi.

La raporto konsistas el sep ĉapitroj: 1. Enkonduko; 2. Lingva politiko, publika politiko kaj fremdaj lingvoj; 3. Rendimento de lingvaj kompetentecoj; 4. Entreprenoj kaj fremdaj lingvoj; 5. Lingvodinamiko; 6. Tri scenaroj; 7. Kiaj strategioj.

La aŭtoro atentigas, ke lia studo ne okupiĝas pri pedagogio (kiel instrui), sed pri politiko (kiujn lingvojn instrui kaj en kiuj situacioj). Ĝi analizas tri eblajn scenarojn: sole la angla lingvo (1), plurlingvismo (2) kaj Esperanto (3).

Britio elspezas ĉiujare 10 miliardojn da eŭroj por la nuna domino de la angla, la plurlingvismo estus ankoraŭ pli multekosta, sole Esperanto ŝparus al Eŭropa Unio 25 miliardojn da eŭroj jare (inkluzive Brition). Tamen la psikologiaj obstakloj (antaŭjuĝoj) malhelpas aplikon de la tria scenaro. Por multaj homoj la angla estas bona

komercaĵo (tradukistoj, interpretistoj, instruistoj), profitas el ĝi turismo, multaj lernantoj venas studi la lingvon en Brition, kiu aliflanke ne bezonas instrui fremdajn lingvojn kaj tiel ŝparas. Scii la anglan estas avantaĝo por akiri bonan laboron.

La lingva politiko rilatas al lingva planado, al valoro de la lingvoj, al investo de homo por ellerni fremdan lingvon, akiri per ĝi bonan laboron kaj helpi sian entreprenon avantaĝe komerci. La lingvodinamiko studas kapablon de lingvoj disvastiĝi kaj akiri avantaĝan pozicion kompare kun aliaj lingvoj.

EU oficiale aprobis la plurlingvismon (scenaro 2), sed en la praktiko aplikiĝas ĉiam pli nur la angla (scenaro 1). La aŭtoro atentigas, ke akcepto de Esperanto (scenaro 3) ne estus nur simpla anstataŭigo de unu „monarkia“ lingvo per alia, sed solvo justa kaj pli facila por lernantoj.

Por realigo necesas venki antaŭjuĝojn kaj eduki instruistojn, kio povas daŭri plurajn generaciojn. Tial nun necesas defendi la principon de plurlingvismo, postuli de eŭrop-uniaj oficistoj scion de minimume tri lingvoj, kuraĝigi studentojn lerni ankaŭ aliajn lingvojn ol la anglan, subteni interpretajn kaj tradukajn servojn. Tiuj servoj nome montras, ke la amatora scio de la angla vere ne sufiĉas por ĝuste esprimi kaj traduki fakajn ideojn.

-mm-

Schůze výboru ČES

Dne 11.2.2006 se uskutečnila 2. schůze výboru ČES. Hlavním bodem bylo schválení rozpočtu na rok 2006, příprava 12. konference ČES a zpráva tajemníka. Rozpočet na rok 2006 bude deficitní s tím, že výbor najde řešení na snížení výdajů k dosažení alespoň rozpočtu vyrovnaného. 12. konference ČES se uskuteční ve dnech 22.-24.9.2006 v Českých Budějovicích. Na konferenci bude možné uskutečnit setkání malých zájmových skupinek v samostatných místnostech. Tajemník ve své zprávě informoval o inventuře majetku svazu, o probíhající kontrole z FÚ za rok 2003 a o klesajícím počtu členské základny. Výbor považuje za svůj hlavní úkol zvrátit tento nepříznivý vývoj.

Konference ČES

Ve dnech 22. až 24. září 2006 se uskuteční v Českých Budějovicích letošní konference Českého esperantského svazu. Chceme připravit zajímavý program, ve kterém si každý účastník vybere to své.

Kromě společného plenárního jednání v sobotu dopoledne plánujeme program ve dvou či třech oddělených skupinách tak, abychom vyšli vstříc zájemcům o reportáže z uskutečněných akcí, zájemcům o jazykové problémy, lidem, kteří si chtějí společně zazpívat či zasoutěžit, stejně jako těm, kteří chtějí poznat České Budějovice.

Konference je shromážděním členů ČES, proto chceme program připravit ve spolupráci s vámi, účastníky konference a členy svazu. Uvítáme proto i vaše podněty a vaše vlastní příspěvky, čím

obohatit program konference. Své návrhy můžete zasílat na adresu Jiří Tomeček, Dr. Bureše, 370 05 České Budějovice nebo elektronicky na mail jirka.tomecek@post.cz.

UK ve Florencii 2006

Případní zájemci o autobusovou dopravu a ubytování na UK ve Florencii se mohou předběžně přihlásit u Mirky Tomečkové, tel. číslo 607 624 926 nebo na e-mail mirka.tomeckova@seznam.cz.

Bukedo

„Klub přátel Karla Jaromíra Erbena“ shání do svých sbírek esperantskou verzi Erbenovy Kytice, která vyšla v roce 1938 v Pumprově překladu pod názvem „Bukedo“. Pokud vlastníte tuto knihu a mohli byste ji postrádat, uvítá ji

Klub přátel K. J. Erbena
Paní Zdeňka Nováková
Na Drázkách 279
507 71 Miletín

Kniha Julie Šupichové

V roce 1939 vydala J. Šupichová knihu *Zajímáte se o esperanto? 150 otázek a odpovědí o esperantu a jeho hnutí*. (Potštejn, BES 1939, Tiskem Ant. Pražáka v Jablonném n. Orl.).

Nevíte někdo o dochovaném exempláři, který by bylo možno zapůjčit, okopírovat nebo z něj alespoň do telefonu přečíst některé údaje pro odbornou historickou práci? Pokud ano, ozvěte se prosím na adresu Mgr. Zdeněk Hršel, Rudná 51, 569 04 Brněnec, tel. 461 523 587. Můžete také poslat mail na adresu redakce (malovec@volny.cz).

Výsledky hospodaření 2005 a rozpočet ČES na rok 2006

	skutečnost 2005		plán 2006	
	příjmy	výdaje	příjmy	výdaje
	CELKEM	282353	271814	206000
členské příspěvky	86435		85000	
prodej knih a materiálu	9196	2686	8000	2000
písemné kurzy	3600	2379	3000	2000
předplatné STARTO	1213		900	
úroky v bance	66		100	
dary členů	19318		25000	
konference/sjezd ČES	66475	60485	70000	60000
předplatné časopisů	12610	9124	10000	9000
UEA 2005	66731	37137		
UEA - provize - ind. čl.			4000	
UEA - kolektivní členství				3200
sekce a kluby	16709	13856		
režijní materiál		1279		1000
nákup knih		834		1000
cestovné a stravné		12880		12000
poštovné		2320		2000
telefon a internet		7372		4000
funkční odměny		1530		
vedení účetnictví		25500		24000
nákup služeb		2926		2000
odvod daně		4770		
poplatky bance		3966		2000
tisk STARTO *		24272		40000
poštovné a balné STARTO		29073		26000
tvorba a distr. STARTO		4800		4800
muzeum Č. Třebová				2000
nájem za sklad		24483		18000
dary a reprezentace		142		1000

* V roce 2006 bude placeno i číslo 4/2005.

ĈEA-retkomunikoj

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio por ĉiuj rete atingeblaj membroj, sed ankaŭ senpage sendata al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonajn. Se vi tamen deziras ricevi ilin, sufiĉas via mesaĝo al chrdle@kava-pech.cz. Ni prezentas la plej freŝajn ret-komunikojn ankaŭ por la neretanoj.

1. POPULARIGO DE ESPERANTO EN BELEGA HISTORIA EJO

La 2-an de marto ekde la 15-a horo, enkadre de regulaj "Literaturaj ĵaŭdoj" en Spegula kapelo de Klementinum (Zrcadlova kaple Klementina) en Prago okazis prezentado de la eldonejo KAVA-PECH. Ĝi uzis la okazon kaj fokusigis la intereson (krom sia lasta ĉeĥa eldonaĵo, nome fabel-libro "Pohádky s Mákem") al prezento de Esperanto prezentante el siaj libroj precipe tiujn rilatantaj al Esperanto, nome la novaĵojn "Esperanto pro děti 2" kaj la 3-an eldonon de "Esperantem za tři měsíce", sed ankaŭ "Gramatiko de Esperanto", "Ilustrita Frazologio", ambaŭ vortarojn Esperantan-ĉeĥan kaj ĉeĥan-Esperantan, sed ankaŭ tradukojn el Esperanto ĉeĥen ("Interlingvistika" de D. Blanke kaj "Zamenhofova ulice" de R. Dobrzynski).

2. EKSKURSOJ EKSTER ĈEĤION:

Buse al la Universala Kongreso de Esperanto en Florenco eblas vojaĝi kun esperantistoj el České Budějovice. Provizore oni kalkulis la prezon 7 000,-

Kĉ por la buso kaj la loĝado. Oni loĝos ekster la multekosta urbocentro. Eblas ankaŭ aliĝi al ekskursoj. Ĝis nun aliĝis 25 interesatoj - tial vi ankoraŭ havas eblon partopreni! Pliaj informoj ĉe mtomeckova@kpmg.cz

3. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) revigliĝas post januara paŭzeto pro la universitata ekzamenperiodo. Ankoraŭ antaŭe, du ĉeĥaj junuloj ĉeestis en la germana urbo Xanten la 49-a Internacian Seminarion, silvestran junularan aranĝon, kiu kunigis 174 ĉefe eŭropajn esperantistojn. Dum ĝi okazis i.a. sukcesa projekciado de la ĉeĥa filmfabelo Lotrando kaj Zubejda kun esperantlingvaj subtekstoj. La tradukon pretigis grupo de volontuloj el ĈEJ. La aranĝon ĉeestis ankaŭ profesia filmisto, kiu tie faris du varbofilmetojn pri Esperanto, en kiuj aktoras ambaŭ niaj reprezentantoj. Raporto pri la aranĝo kun fotoj kaj la filmetoj troveblas en la retpaĝaro de ĈEJ. En 2006 aliĝis al ĈEJ jam 3 novaj membroj. Kelkaj el ili lernas Esperanton per komputila programo Kurso de Esperanto, por kiu ĈEJ disponigas kursogvidanton. Sume ĈEJ nun havas 44 membrojn. La atento de la asocio nun fokusiĝas al la venontaj printempaj kaj someraj junularaj aranĝoj, el kiuj menciindaj estas Kreiva metiejo okazonta marte en Slovakio kaj la 62-a Internacia Junulara Kongreso (IJK), kiu ĉi-aŭguste okazos en Sarajevo en Bosnio kaj Hercegovino. La plej grava aranĝo tamen sendube estos la Internacia Junulara Renkonto, kiun ĈEJ okazigos inter la 8-a kaj 15-a de julio 2006 en Ve-

lehrad, Ĉeĥio, paralele kun la 59-a kongreso de IKUE. Temos pri la unua internacia junulara renkontiĝo en Ĉeĥio post pluraj jaroj. Aktualaj kaj pliaj informoj pri ĉeĥa junularo ĉiam troveblas ĉe <http://www.esperanto.cz/cej>.

4. JUNULARO DE SET LANĈOV

Por la ĉijara Somera Esperanto-Tendaro (SET) ricevas rabaton membroj de "Junularo SET-Lančov" (vidu <http://esperanto.blahus.cz/cxej/iru.php?lancov>) kaj pliajn rabatojn, se ili helpas propagandi la tendaron en siaj lernejoj kaj akiras novajn tendaranojn. La supre menciita retejo prezentas ne nur fotogalerion kaj lingvajn ludojn, sed ebligas aliron al unuopaj etapoj registritaj ĉe <http://www.tabory-vysocina.cz> kun rektaj retaj aliĝiloj (on-line), kiujn kolektas Věra Podhradská podhradska@volny.cz.

5. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANĜOJ EN ĈEĤIO

La kalendaro estis publikigita en ĈEA-retkomunikoj 4/2005 kaj ni intencas ĝin denove aperigi en venonta numero de la retkomunikoj. Tial ĉiuj organizantoj estas petataj sendi koncizajn informojn (daton, nomon, temon, kontaktadreson, se eble retan) al la retadreso chrdle@kava-pech.cz. Nur de vi dependas, ĉu la listo estos kompleta aŭ ne! Krome, ne forgesu, ke iam ajn vi povas trovi la kalendaron kaj multajn pliajn utilajn informojn ĉe <http://www.esperanto.cz>.

6. ĈEFARANĜOJ DE NAJBARAJ ESPERANTO-ASOCIOJ:

Slovakio: Tutslovakia renkontiĝo de SKEF (Slovakia Esperanto-Federacio)

kaj SKEJ (Slovaka Esperanto-Junularo) en Piešťany 2006-05-26/28. Vd.

<http://skej.esperanto.sk/arangoj.php?lingvo=eo&kio=45&akcia=podujatie>

Germanio: Printempa Esperanto-Kunveno (BELO + BAVELO) kun la temo: "Eŭropo - tio estas Vi! Ĉu Eŭropo bezonas komunan lingvon?", Neu-Ulm-Ludwigsfeld, 2006-03-31/04-02. Info: Armin Grötzner ae.groetzner@t-online.de


Jubilea Germana Kongreso (Germana Esperanto-Asocio), BRAUNSCHWEIG, 2006-06-02/05:

<http://jubileagek.ic-herzberg.de/>

Pollando: La 22-a ARKONES - Artaj konfrontoj en Esperanto (Pola Esperanto-Junularo), Poznań, 2006-09-29/10-01.

<http://www.arkones.republika.pl>

7. ESPERANTO-MURKALENDARO
Kun permeso de la aŭtoro Petro Baláž mi sciigas al la interesatoj, ke eblas elŝuti murkalendaron por 2006, kun E-fotomozaiko, faritan de fotoj el UK kaj IJK 2005. Laŭ la informo de la aŭtoro ĝi estas farita por presi ĝin en bona kvalito ĝis la formato A3 (ne provite). Li donas rajton al iu ajn libere presi kaj surmurigi ĝin. Dankon al li. Jen la adreso: <http://esperanto.sk/varbiloj/kalendaro2.jpg>



Gratuloj

Komence de 2006 festas siajn viv-jubileojn honoraj membroj de ĈEA Karel Kraft, Jiří Pištora, Zdeněk Pluhař, Vlastimil Kočvara, Milo-slav Šváček kaj ankaŭ nia asocia vicprezidanto kaj eldonanto de Esperanta literaturo Petr Chrdle. Al ĉiuj ni dankas pro ilia laboro por Esperanto, kiun certe ne necesas prezenti, ĉar ni ĉiuj ĝin konas.

Granda vortaro Esperanta-ĉeĥa

de Josef Hron estas elŝutebla de la paĝo <http://esperanto.wz.cz/>. La vortaro estas en Excel kaj havas 34,2MB. La paĝon prizorgas Jaroslav Veselý.

Esperanto inter tarif-lingvoj

La gazeto TOP (por ĉeĥaj kaj slovakaj tradukistoj kaj interpretistoj) en sia decembra numero 2005 publikigis tarifojn por tradukado, unuafoje tie aperis ankaŭ Esperanto en grupo D (kun la albana, dana, portugala, sveda ktp.).

Ĉeĥoj kaj fremdaj lingvoj

Laŭ statistikoj de Eŭrobarometro ĉeĥoj scias: almenaŭ unu fremdan lingvon 61%, du lingvojn 29%, tri lingvojn 10%, la germanan 28%, la anglan 24%, la rusan 21%, la francan 4%. En EU regas la anglan kiel fremdan lingvon 38% da civitanoj, male neniun fremdan lingvon 44%.

39-a ILEI-Konferenco

okazos de la 25-a ĝis la 29-a de julio 2006 en *Parma* kaj estas proponata kiel unu el la antaŭkongresaj eblecoj. Temo de la konferenco: *Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj*. La konferenco sesios en la *Instituto Salesiano San Benedetto*. Vidu <http://www.ilei.info/>.

Politikistoj respondis

Prezidento Václav Klaus kaj ĉefministro Jiří Paroubek respondis al nia asocia prezidantino Jana Melichárková - kiam ŝi informis ilin pri esperantistaj aktivadoj en la Eŭropa parlamento -, ke nia movado estas al ili simpatia, tamen ili ne kredas, ke Esperanto povus solvi la lingvan problemon en Eŭropa Unio.

„Lingva diverseco estas natura, sed per si mem nek bona nek malbona. Ĝi estas rezulto de spontanea evoluo. Protekti propran lingvon kaj kulturon estas intereso de naciaj ŝtatoj, ne de EU.

Ĉiu homo devus scii almenaŭ unu mondlingvon - se li lernos ankaŭ Esperanton, tiom pli bone. Sed la lingvo devas mem pruvi siajn kvalitojn, ne atendi subtenon de diversaj institucioj,“ opinias V. Klaus.

„... en agendo de miaj traktadoj ne estas tiu temo enhavita.

Mi esperas, ke ĝuste esperantistoj kiel proksimigantoj de la popoloj subtenos la ideon de unuiĝinta Eŭropo,“ skribis J. Paroubek.

Kio estas ELFo?

En enciklopedio ni povas trovi, ke en germana kaj skandinava mitologioj elfo estas eta koboldo, en NPIV ĝi estas priskribita kiel “skandinava aerfeo; enmetitaj estas ankaŭ Zamenhofaj aplikoj: la monteto de elfoj; elfreĝo; elfknabino.” Sed nia aktuala ELFo estas mallongigo de la nomo «**Esperantologia kaj Literatura Forumo**», kiun en Ĉeĥio nun fondis grupo de personoj, kiuj laŭ krea maniero kunlaboros en la grupoj: interlingvistika, esperantologia, E-lingva, pedagogia, literatura, poetika, terminologia, historia, vortarista, eble ankaŭ scienca-teĥnika. La forumo estas tute sendependa, labori en ĝi povas kiu ajn, kiu deziras aktive kontribui al kvalita kresko de ĉeĥaj esperantistoj. Kontaktadreso: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno; podhradska@volny.cz kaj Jan Werner, Dřínová 18, 612 00 Brno; werne@tiscali.cz.

KAVA-PECH la naŭa

Kun 46 libroj eldonitaj inter 1991-2005 estas KAVA-PECH la naŭa plej granda E-eldonejo. La unua estas pola Libro-Mondo (114 libroj). En 2005 aperis entute 159 novaj libroj de ĉiuj eldonejoj sume, kio estis relative malmulte kompare kun aliaj jaroj.

Povilas Jegorovas

La Esperantisto de la jaro 2005

Kaŭna advokato Povilas Jegorovas, prezidanto de la Litova Esperanto-Asocio, estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2005 - pro la bona preparado kaj sukcesa realigo de la 90-a Universala Kongreso de Esperanto kaj de la 4-a Nitobe-Simpozio en Vilno; - pro la ekzemplodonaj rilatoj kun litoviaj aŭtoritatoj, intelektuloj kaj amaskomunikiloj, danke al kiuj Esperanto progresas en Litovio; - pro la kunordigo de eldonado de gravaj libroj pri Esperanto en la litova lingvo.

Vojaĝo en Esperanto-lando

de Boris Kolker estas la plej populara libro de la lastaj jaroj. UEA aperigis en 2005 jam la trian reverkitan eldonon.

En 26 lecionoj riĉe ilustritaj la libro prezentas Esperanto-kulturon kaj historion, proponas legaĵojn el la E-literaturo kaj historio. El ĉeĥaj aŭtoroj aperis poemeto de Ŝtefo Urban kaj la 25-a leciono estas enkondukita per foto pri planto de E-arbo en Znojmo en la jaro 2000. Ĉiun lecionon finas kontrol-demandoj pri la lernata temo. Multaj malmulte konataj fotoj pri Zamenhof.

-mm-

Partneraj urboj de Brno

Brno kunlaboras kun la partneraj urboj Rennes (franca Bretonio) kaj Stuttgart (Germanio). En somero 2005 vizitis la moravian urbon kvar gejunuloj el Rennes (Juliette, Vincent, Stefan, Sebastian), trarigardis la urbocentron kaj abismon Macocha, en decembro Marek Blahuš kiel reprezentanto de Brno partoprenis festadon de 100 jaroj de Esperanto en Stuttgart. Pri la vizito el Rennes informis eĉ la magistrata bulteno de Brno kaj mencias ĝin la magistrata retejo.

100 jaroj de Esperanto en Stuttgart

Dimanĉo (11.12.2005) estis la ĉefa tago de la centjariĝaj solenaĵoj kaj en tiu tago okazis en la generacia centro de Stuttgart la oficiala programo, kiun ĉeestis ĉirkaŭ sesdek esperantistoj - membroj de la klubo kaj gastoj de tuta Germanio kaj du aliaj landoj (reprezentantoj de la ĝemelurboj Brno kaj Łódź).

La antaŭtagmeza parto de la programo konsistis el faka prelego pri la historio de Esperanto-movado en Stuttgart. Ni eksciis pri la kuraĝa kaj senlaca agado de Paul Christaller, profesoro ĉe artmetia lernejo en Stuttgart, kiu fondis je la 27-a de januaro 1905 kun tri kunuloj la unuan Esperanto-grupon en Stutgarto kaj

Badeno-Virtembergo. Jam ĝis la fino de la jaro la grupo atingis membro-nombron de 22. En 1933 Christaller demisiis pro la tiam inaŭguriĝinta naziisma registaro de Adolf Hitler, kiu forte subpremadis Esperanton kaj dum sia firegado mortigis en koncentrejoj i.a. ankaŭ multegajn esperantistojn. Post la dua mondmilito la grupo refondiĝis kaj ĝis nun en Stuttgart ĝi vivas kaj aktivas.

Ĉar estis dimanĉo, oni enprogramigis en tiu tago post la tagmanĝo ankaŭ ekumenan diservon en Esperanto por la interesiĝantoj elinter la partoprenantaro. Ĝin celebris loka pastro-esperantisto. Tiaj esperantlingvaj mesoj okazas en Stuttgart regule.

La posttagmeza programo estis multe pli bunta kaj distra ol la matena - interalie oni prezentis du Esperantlingvajn pupteatrajn unuaktaĵojn adaptitajn laŭ libroj de konataj germanaj verkistoj, oni havis la eblecon babili ĉe bongustaj dolĉaĵoj kaj trinkaĵoj, amuziĝi ĉe diversspecaj ludoj kaj oni tiam ankaŭ prezentis la invititajn gastojn de la ĝemelurboj. Mi transdonis donacojn kaj salutis la klubanojn de Stuttgart en nomoj mia, de la partnera Esperanto-klubo de Brno kaj ankaŭ ĝenerale de ĉiuj iliaj ĝemelurbanoj de Brno.

Laŭ Marek Blahuš

<http://esperanto.blahus.cz/verkoj/stuttgart2005.htm>

Rudolf Štursa, savanto de judoj

Homo kontraŭ holokaŭsto

La nomon de Přemysl Pitter, unika savanto de judaj kaj germanaj infanoj, oni dum kvardek jaroj ne aŭdis malantaŭ la fera kurteno. Li foriris el sia hejmo en 1951, ĉar li ne plu povis dediĉi siajn fortojn al tiuj, al kiuj apartenis lia tuta vivo, al siaj zorgatoj en Milíčův dům (Milíč-domo). De tiu tempo li vivis dek jarojn ĉe Nurenbergo en Bavario, plenumante funkcion de reformacia laika pastro en internigejo por fuĝintoj el orientaj landoj. Poste li vivis en Svisujo, en vigla kontakto kun pluraj ekzilaj grupoj. Tie li mortis antaŭ tridek jaroj.

Same nekonata restas nomo de homo kun simila sorto, Rudolf Štursa, je 16 jaroj pli juna ol Pitter. Kiel 27-jara, en la jaro 1938, li grandskale, propriniciate kaj tre inventeme praktikis fuĝadon de judoj el tiam Ĉeĥoslovakio. Eĉ post la okupacio de la resto de iama Ĉeĥoslovakio far Hitler en marto 1939 li daŭrigis sian kvazaŭ aventureman, sed fakte ege riskan agadon ebligante fuĝon al multaj judoj.

Oni iam diras, ke Přemysl Pitter kaj Rudolf Jan Štursa estas ĉeĥaj similuloj de Oskar Schindler. Nun de post la falo de komunismo oni jam iom malvualas la famon pri iliaj kuraĝaj sintenoj. Sed la motivoj de ambaŭ ĉeĥoj kompare kun la naziista oficiro

kontraŭpoluse diferenciĝas. Pri ambaŭ ĉeĥoj oni pretigis filmojn, kompreneble nur modestajn dokumentajn filmojn per modestaj monaj rimedoj, nekompareble sobraj kompare kun la pompa, mondvaste famigita filmo „La Listo de Schindler“ (1993), filmita de tutglobe fama usona reĝisoro Steven Spielberg. Nu, ni kredu, ke venos tempo, kiam oni ie, iam kolektos sufiĉe da monrimedoj por digne filme prezenti ankaŭ verajn heroajn okazaĵojn, kiuj tuŝas la teruran epokon de holokaŭsto.

Rudolf Štursa naskiĝis la 5-an de julio 1911. Post finstudo de juro li okupiĝis per tradukado el la angla lingvo. La politika situacio estis tiam jam streĉita. Li apartenis al tiuj, al kiuj ne plaĉis la politiko de „appeasement“, la cedado al la postuloj de Hitler. Tiu cedado alportis siajn unuajn amarajn fruktojn per anekso de Aŭstrio al Germanio la 13-an de marto 1938. La judoj en Germanio spertis la brutalecon de Hitler jam antaŭ aneksio de Aŭstrio. Oni ne dubis, ke la plua atako celos Ĉeĥoslovakion. Konatulo de Štursa, judo František Mautner, konsideris la eblon elmigri kaj diskutis pri tio kun li. Štursa konsilis nepre elmigri kaj kiel eble plej malproksimen. František Mautner decidis por Novzelando. Por faciligi la elmigran procedon, Štursa rekomendis al li akcepti bapton, ĉar la loĝantaro de Novzelando estas plejparte angledevena kaj kristana.

En la domo numero 171 en la strato Nerudova en Prago loĝis paroĥestro de la malnovkatolika eklezio Martin Jan Vochoč, konatulo de Ŝtursa. Ne gravis, ke la eklezio estas preskaŭ nekonata. Por la membroj de la anglikana eklezio estas la malnovkatolika eklezio eĉ pli proksima, ĉar ĝia deveno ligiĝas al rifuzo de la senrareco de la papo, pri kiu decidis la vatikana koncilio la 18-an de aprilo 1870. Nun ĝia centro troviĝas en Utreĥto en Nederlando kaj en nia lando ĝi ne havas multajn sameklezianojn. La paroĥestro Martin Jan Vochoč estis erudita homo, historiisto kaj arkivisto de la malnovkatolika eklezio. Volonte li pretigis la baptoateston. Por la celo, por kiu la judoj uzis la baptoateston, ĝi havis avantaĝon: ĝin oni pretigadis nur latine kaj ĝi ne enhavis la daton de la bapto, sed nur la daton de la tago, en kiu la dokumento estis pretigita.

La atmosferon de tiu tempo, en kiu „la pli alta raso“ persekutis kaj senkrupule masakris judojn kaj ceterajn „nepurrasajn“ naciojn, ilustras iom strange, nekompreneble la fakto, ke la paroĥestro Vochoč evitis persekuton de la nazioj pro la nenormala produktado de la baptoatestoj, fakte pro falsado minacata el la naziista vidpunkto per mortpuno, kompare kun la fakto, ke post la milito, en la jaro 1947, kiam la komunistoj eĉ ne havis ankoraŭ absolutan politikan potencon en Ĉeĥoslovakio, la de komunistoj influita tribunalo kondamnis paro-

ĥestron Vochoč al kvinjara puno en la prizono Valdice. Post reveno el ekzilo Ŝtursa antaŭ kelkaj jaroj provis rehonorigi la paroĥestron. Ni ne havas lastajn informojn pri la procedo aŭ rezulto de la enketado.

La sukceso en la uzo de la bapto-dokumentoj por la elmigro ne restis longe izolita fenomeno. La 26-an de decembro 1938 la familio de Mautner invitis Ŝtursa en sian domon por esplori, ĉu eblas plu daŭrigi la fabrikadon de la baptoatestoj por pluaj interesiĝantoj. Iu el la ĉeestantaj postulantoj eĉ demandis, ĉu li povas elpeti nuran formularon. Kompreneble, ne niu oficisto akceptus tian okulfrape falsan dokumenton. Sed doktoro Ŝtursa solvis la problemon. Li elpetis (aŭ nur simple prenis?) neuzitan formularon kaj alia lia amiko, tipografo František Fleischmann pretigis por li unu milon da tiaj formularoj. La loĝejo de doktoro Ŝtursa en la strato „U zeměpisného ústavu“ numero 505 en Prago fariĝis rapide konata kaj Ŝtursa pretigis la baptoatestojn kiel sur ĉenstablo.

Sed post certa tempo kelkaj konsulejoj rifuzis akcepti tro ofte prezentitajn freŝajn baptoatestojn, evidente falsajn. Ŝtursa denove trovis solvon. La patro de František Mautner, iama komercisto Viktor Mautner, estante zorgoplena entreprenisto, konservis en sia arkivo malnovajn dokumentojn kun iamaj aŭstro-monarkiaj impostmarkoj. Malglui ilin ne estis komplika tasko. Iom pli da zorgo signifis produkto de

falsa stampilo de la malnovkatolika eklezio. Tiun taskon plenumis alia amiko de Ŝtursa, iama kunlernejano Pištora. Nun ĉiuj konsulejoj akceptis tute fidindajn baptoatestojn, produktitajn helpe de impostmarkoj, trovitaj en kestoj ie en subtero de iama komercisto. Nun la juristo Ŝtursa denove pretigadis la bezonatajn baptoatestojn, tamen certe riske kaj tre singardeme, por la vizoj aŭ transitvizoj de ĉiuj petantoj.

Ne ĉiuj judoj hastis fuĝi el sia patrolando. Ankaŭ la patro kaj la patrino Mautner same kiel ilia filino Edita ne sekvis la avertojn kaj admonojn de Ŝtursa — kaj iliaj vivoj finiĝis en gaskameroj. Ŝtursa daŭrigis sian danĝeran falsadon de dokumentoj eĉ post la 15-a de marto 1939 (kiam Hitler prempaŝis la reston de la iama Ĉeĥoslovakio), serĉante tamen samtempe plej sekuran breĉon kiel eskapi el la Tria regno de Hitler. Helpon li serĉis ankaŭ ĉe siaj kunlaborantoj — ĵurnalistoj, kiel ĉe Henry Stowin el Daily Herald. Li forveturis kun li al Ostrava kaj ne havante validan pasporton li provis neleĝan transpaŝon. Tio ne tuj sukcesis, tamen post plua provo kun helpo de alia amiko li atingis Pollandon.

Nur tiu, kiu ion similan travivis, scias, kiom malfacila estas vivo de elmigrinto en tia politike tre nestabila tempo. Serĉante iajn iom tolereblajn poziciojn, li vagis tra Krakovo, Katovice, Varsovio, antaŭ ol li ricevis permeson por Anglio, kie

li restis ĝis 1941.

Dum la milito kaj en postaj jaroj JUDr. Rudolf Ŝtursa travivis ege buntan vivon, kiu postulus longan surpapidon. Dum la pretigado de la baptodokumentoj fariĝis por li jam forgesita epizodo de lia vivo. Nun (ekde 1998) li estas por la dua fojo edziĝinta, lia edzino estas je 29 jaroj pli juna. El la unua edziĝo li ne havas infanojn. Li havas du infanojn el ĉi tiu dua geedziĝo: filon (1968) kaj filinon (1969).

Nia lasta informo pri li estas el la jaro 1998. Tiam, preskaŭ jam naŭdekjara, vivante denove en Ĉeĥio, volonte ricevus iujn informojn pri pluaj vivsortoj de iuj liaj „savitoj“. Bedaŭrinde, li ne registris la pretigadon de la falsaĵoj kaj pro lia plua komplika vivo li nemulton aŭdis pri la sorto de la ekzilintoj. Li neniam postulis pagon por la dokumentoj. Kelkaj liaj „klientoj“ lian penadon iam proprainiciate rekompencis. Informojn pri lia vivo kompilis en la jaro 1998 Radek Klempera. Tiam li en interreto skribis alvokon: *Pokud máte nějaké bližší informace nebo jiné informace o JUDr. Štursovi, nebo o osudu těch, kdo dostali od něho křestní list, budu nesmírně rád, když mi napíšete.* Kaj mi aldonas: Se vi havas iujn pli freŝajn informojn ol tiuj, kiuj estas en ĉi tiu artikolo, bonvolu ankaŭ informi min.

Karel Kraft

Zjednodušení internetových adres

Protože jsme obdrželi stížnosti, že zapamatovat si adresy našich www-stránek není snadné, zavedli jsme jako novou službu možnost vyjít z domény www.esperanto.cz a za lomítko připsat název klubu, sekce, časopisu apod. (z technických důvodů malými písmeny). Dojde k automatickému přesměrování na příslušné stránky. Pokud jsme na někoho zapomněli, omlouváme se a po upozornění doplníme. Název musí být stručný, bez diakritiky.

www.esperanto.cz/brno

www.esperanto.cz/mboleslav nebo

www.esperanto.cz/mlboleslav

www.esperanto.cz/svitavy

www.esperanto.cz/prerov

www.esperanto.cz/pribram

www.esperanto.cz/praha

www.esperanto.cz/lancov

www.esperanto.cz/trebic

www.esperanto.cz/ikue

www.esperanto.cz/aeH

www.esperanto.cz/informadiko

www.esperanto.cz/cej

www.esperanto.cz/ilei

www.esperanto.cz/pedagogika

www.esperanto.cz/knihovna

www.esperanto.cz/muzeum

www.esperanto.cz/kava-pech

www.esperanto.cz/auroro

www.esperanto.cz/starto

BioLib - Biologia Libraro

En la retejo <http://www.biolib.cz> troviĝas 130 mil sciencaj latinaj esprimoj pri fungoj, plantoj kaj animaloj, 30 mil en la ĉeĥa, 12 mil en la angla kaj 10 mil el ili estas tradukitaj al Esperanto (laŭ PIV kaj aliaj fontoj).

Verŝajne temas pri unu el la plej ampleksaj biologiaj nomenklaturaj Esperantlingvaj en la interreto. Oni povas plu redaktigi kaj kompletigadi ĝin, ne nur per Esperantaj, sed ankaŭ alilingvaj esprimoj (30 lingvoj). La sistemo ebligas elekti vortarojn laŭ ĉiu ajn kombino inter la enkondukitaj lingvoj kaj samtempe elekti fakon (tuton aŭ ekz. nur plantojn, nur mamulojn ks.).

Invito al populara turista renkontiĝo

Esperanta klubo el Pilzeno invitas vin denove jam al kvina turista renkontiĝo en urbeto Plasy (TREP), kiu okazos en tagoj 15.-18.6.2006. Vizitantojn atendas denove piedpromenoj en belega ĉirkaŭaĵo, tuttaga bus-ekskurso kaj vespere amika amuzo kaj videoprojekcio. Unutaga loĝado en kelklitaj ĉambroj kun manĝo tute por 300,- Kč (15 Eŭro). Aliĝilojn kun adreso, naskiĝdato kaj kun la tempo de alveturo bonvolu sendi al: Václav Kaprál, CZ 331 51 Kaznějov 252, aŭ rete: esperantoplzen@centrum.cz ĝis fino de majo. Ĉiuj estos bonvenaj.

Výsledek ankety

pokračování z minulého čísla

2a Co vás vedlo k vystoupení z organizace? Věk 1, nedostatek financí 2, nekomunikativní vedení 1, problémy s placením příspěvku 1, nevhodná doba schůzek 1, zánik klubu 2, rodinné důvody 1, názorová neslučitelnost 1.

2b Za jakých okolností byste se vrátil(a)? Lepší spolupráce 1, nevím 1, změna doby schůzek 1, pokud by klub vznikl 1.

10 Jaký cíl jste si vytyčil(a) pro svou práci v hnutí? Dobře se učit 4, pomáhat s organizací 10, být dobrým esperantistou 8, bavit se esperantem 3, zpracovat historii klubu 2, informovat o esperantu 18, klubová činnost 13, spolupřátat světovou akci 1, překládat texty 3, popularizovat vědy 1, korespondence 9, učit esperanto 5.

11 Měla vaše dosavadní činnost kladný vliv na rozšíření esperanta? Ano: vytvoření povědomí 14, výuka 11, klubovní činnost 6, noví přátelé 3, vytvoření děl 1 - Jinak: informativní 1.

12 Jak hodnotí vaši činnost přátelé, kolegové ze zaměstnání, sousedé ap.? Kladně: učí se cizí jazyky 2, možná i trochu závidí 1 - Záporně: dnes již neuskutečnitelná myšlenka 4, měl(a) bych se raději věnovat rodině 3 - Jinak: neškodná záliba 7, respektují ji 4, vidí, že slouží při cestování 4, chtějí vědět, k čemu slouží 2.

14 Co brání vašemu dalšímu rozvoji v hnutí? Čas 24, věk-zdraví 8, lenost 7, chybí esperantisté mých zájmů 3, stagnace hnutí 3, nepodpora rodiny 2, finance 2, nezájem mládeže 1, málo cestování 1, pocit marnosti 1, mé zaměstnání 1.

15 Co byste chtěl(a) udělat v hnutí? Pomoc při výuce jiných 14, získat nové členy 9, popularizace mezi seniory 5, literární činnost 4, zpracovat historii klubu 3, korespondence 3, zavést E do škol 2, založit klub 2, propagovat esperanto svými výrobky 2,

popularizace věd 1, udělat učitelské zkoušky 1, získat podporu veřejných činitelů 1, spolupráce s družebními městy 1.

16 Jak vám pomohla znalost esperanta mimo hnutí? Cestování, korespondence 19, snazší orientace v jiných jazycích 16, celkový rozhled 6, osobní život 6, esperantisté mi pomohli 4, při hledání zaměstnání 2.

18. Podporujete zavedení univerzálního jazyka jako jednacímho jazyka EU? Ano: úspora na překladatelích 13, jednodušší komunikace 12, žádné jazykové zvýhodnění 9, přes europoslance 3, rozvíjet E a jeho kulturu 3, nerealizovatelné 2, pomalu s nevolí mocných 2, podle myšlenek Handzlikové a Tišljara 1, strojový překlad 1, vést diskuse 1 - Ne: nereálné 5, ztráta výjimečnosti 1.

19 Proč myslíte, že veřejnost vnímá esperanto negativně, případně je vůbec nezná? Málo informací 35, mnoho angličtiny a němčiny 23, neochota 9, nedůvěra v něco „zázračného“ 4, nepodpora státních úřadů 4, z esperanta není zisk 4, neposkytuje možnost prosadit se 3, radost ze zaměstnání tlumočnicků 2, odrazuje vysoký věk 1.

20 Jak by podle vás měla vypadat osvěta? Info v médiích 26, získat přízeň učitelů 6, zaměřením se na praktické věci 6, zaujmout děti 5, informovat politiky 5, nástěnky-internet 5, vést diskuse 4, pospolitost lepší než agitace 1, dát Starto do prodeje 1.

22. Vážíme si soukromých aktivit propagujících esperanto. Měly by být ale zastřešeny svazem. Souhlasíte? Ano: koordinace je potřebná 23, svaz musí reprezentovat E v ČR 10 - Ne: žádné „pochválení shora“ 14, vítána každá iniciativa 13.

Výherci knih z ankety: Milada Kolářová, Marie Opplerová, Josef Filip.

Miroslav Vaněk

Více informací podá Miroslav Vaněk, vanekmi@centrum.cz

El niaj kluboj

Brno. En 2005 la klubo havis 22 pagintajn membrojn, kiuj plejparte estas membroj ankaŭ de Societo por internacia lingvo Esperanto en Brno. La klubaj kunvenoj okazis ĉiumerkrede, la trian merkredon en monato estis la komuna programo preparita de la menciita societo. Ĉiu kunveno havis prelegan programon anoncitan en la gazeto *Kam v Brně za kulturou* kaj en interreto. La klubo kaj societo komune eldonis broŝuron Verda Duopo pri la vivo kaj verko de Josef Vondroušek kaj Vilibald Scheiber, naskiĝintaj antaŭ jarcento.

Ĉeská Třebová. El fabelo en fabelon estis ideo de E-Silvestro aranĝita de gesamideanoj el AMIKECO en Ĉeská Třebová. La 29-an de decembro 2005 ĝi allogis en restoracion HORBYTKA ĉirkaŭ 50 ĉeestantojn el 26 ĉeĥaj urboj kaj vilaĝoj. Alveturis ankaŭ Gerry el Nederlando, anino de Amikeco. La programon gvidis Jana Křížková, al danco muzikis sinjoro Boríšek. En konkurso gajnis trian premion lokaj esperantistoj kun kanto pri „Budulínek“, duaj estis esperantistoj el Pardubice kun fabelo pri Dikfingreto kaj la unuan premion gajnis gesamideanoj el E-klubo en Polička kun „Spickuka dometo“. Premiojn de konsolo ricevis ankaŭ multaj aliaj "fabelaj personoj" - lupo, papilio Emanuel, Papava knabinjo ktp.

Dum la tri lastaj jaroj oni vidis, ke jam finiĝas la erao de E-baloj. Sabate la 18-an de februaro 2006 en blindula klubejo kunvenis rememorantoj de la 36-jara erao, kantante ĉe gitaro kaj akordeono de geedzoj Poukar. Jiří Pištora en E-kronikoj eltrovis, ke en kelkaj jaroj estis

eĉ baloj du. Do, gedancantoj povis ĉeesti 39 E-balojn. Iam eĉ ambaŭ baloj estis plenaj kaj restis ankoraŭ 180 interesatoj sen biletoj. Česká Třebová estis vizitita okaze E-baloj de multaj eksterlandaj esperantistoj. Laŭ kronikoj estis interesa speciale la unua E-balo en jaro 1970. Tiam 8 samideanoj volis aranĝi balon, sed ili ne sciis, ĉu estos pri ĝi intereso. Kun muziko de sinjoro Škeřík ili faris interkonsenton, ke muzikistoj ricevos monon, nur kiam la balo estos sukcesa. En alia kazo ili promesis ludi senpage. Unua E-balo sukcesis, la muzikistoj ricevis salajron. Nun kun esperantistoj sinjoro Škeřík rememoris kaj pliriĉigis la kunvenon ne nur per sia rakonto, sed ankaŭ per malgranda ekspozicio de siaj bildoj.

Ústí nad Labem. En 2005 la klubo havis 16 membrojn, kiuj kunvenis unufoje en monato kaj lernis laŭ lernolibro de W. Auld. La klubon gvidis Prof. RNDr. V. Novobilský (prezidanto), MUDr. P. Páral (vicprezidanto) kaj Mgr. V. Novobilská (kasisto). Pro konstru-riparoj de la urba muzeo la klubo trovis novan klubejon en Polikliniko Doctus (Masarykova 94). La klubo preparis kurson por Fratara Eklezio (8 kursanoj) kaj kunorganizis Ĉeĥan-Saksan Tagon. La klubanoj esperantigis la libron *Taglibro de mia frato* de Chava Presburger (geedzoj Novobilský), poezion de M. Dolistová kaj de regionaj poetoj (Z. Rusín), partoprenis enlandajn kaj eksterlandajn aranĝojn. Por 2006 la klubo preparas internacian kulturan festivalon dediĉitan al 100-jara naskiĝjaro de poetoj Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr, pri kies verkaro oni nun kolektas informojn.

Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek

La 10-an de decembro 2005, rememore al la naskiĝtago de D-ro Zamenhof kaj al Tago de homaj rajtoj, la E-Klubo „La Ponto“ en Písek organizis sian tradician Antaŭkristnaskan renkontiĝon, kiun partoprenis pli ol 30 personoj. Krom membroj de la loka klubo venis ankaŭ gastoj el aliaj urboj, ne nur el Sudbohemia regiono, sed ankaŭ el Plzeň, Benešov kaj Příbram. La aranĝon honorigis per sia ĉeesto ankaŭ ĈEA-sekretario Pavel Polnický, kiu informis pri ĈEA-konferenco en Vyškov kaj pri novaĵoj en E-movado.

Agrabla surprizo estis partopreno de s-ano Miroslav Smyčka, kiu valorigis muzikan programon per sia bela voĉo. Kaj nelastvice, dank‘ al s-anino Margit Turková, venis ankaŭ ŝia amikino s-ino Dianne Ross el Aŭstralio, kiu nun instruas en internacia gimnazio en Hluboká n.Vlt., kie ŝi samtempe gvidas E-kurson.

En la zamenhofa programero estis i.a. prezentita vere leginda libro „Zamenhofova ulice“, verkita en formo de intervjuo de R. Dobrzynski kun la nepo de D-ro Zamenhof, kiun en la ĉeĥa traduko de Jiří Patera eldonis KAVA-PECH.

En la solena kultura programo, kiun preparis kaj gvidis Pavla Dvořáková, estis interligitaj spiritaj kaj popolaj kristnaskaj tradicioj: rita alportado de

la lumo de Amo, Kredo, Paco kaj Espero el la kvar monddirektoj, komuna legado de la kristnaska evangelio, manĝado el unu granda tranĉita pomo je signo de komuneco, farado de boatetoj kaj abundo da kristnaskaj kantoj el plej diversaj landoj. Eksonis ankaŭ Halleluja el la Esperantsonbendo de la oratorio Mesio de G. F. Haendel, rakontoj pri ekesto de la kanto Paca nokt‘ kaj pri kristnaskaj popolkutimoj en la regiono de Písek. Je la fino ne mankis kompreneble riĉa tombolo, kies parto estis ankaŭ belaj donacetoj faritaj de infanoj el infanhejmoj, venditaj kadre de la interreta aŭkcio favore al la konto „Člověk v tísni“.

La renkontiĝo trapasis en agrabla amikeca etoso - la partoprenantoj adiaŭis inspire kaj instigite por E-agado kaj antaŭĝojante pluajn similajn aranĝojn.

Raportis: E-Klubo „La Ponto“ Písek



La urbodomo en Olomouc estas trietaĝa

En Esperanta priskribo de la urbo Olomouc mi interalie legas, ke „*en la centro de Supra placo staras la urbodomo, gotika duetaĝa konstruo kun korto kaj turo...*“

Samtempe mi observas fotografaĵon de la urbodomo kaj mi vidas, ke ĝi estas **trietaĝa**. La vido ne mensogas, la priskribo do estas malvera. Aŭ ĝia aŭtoro, ĉeĥo, erare ellernis, ke la vortoj „*poschodí*“ kaj „*patro*“ estas en Esperanto „etaĝo“. Kio do estas etaĝo?

PIV kaj NPIV: „*La tuto de la ĉambroj aŭ ejoj de domo, kiuj kuŝas sur unu sama nivelo.*“ Tiu ĉi konciza difino estas ĝusta kaj sufiĉa. Sed PIV bedaŭrinde daŭrigas: „*Oni atentu, ke la maniero kalkuli la etaĝojn ne estas la sama en ĉiuj landoj: iuj inkluzivas la teretaĝon, aliaj ekskluzivas ĝin!*“ La aŭtoroj per tiu daŭrigo allasis kaoson, anstataŭ pruvi, ke Esperanto estas klara lingvo.

La daŭrigo rilatas ankaŭ nin, ĉeĥojn, ĉar en nia lingvo krom „*poschodí*“, „*patro*“, estas ankaŭ la vorto „*podlaží*“ kaj ĝuste tiu estas ekvivalento de la Esperanta nomo „etaĝo“ (rememoru la ĉeĥan slange nuancitan „*etáž*“). Ĉiuj etaĝo-niveloj de domo super la apuddoma

ter(en)o estas samrajtaj kaj kalkulataj ekde la unua supertera supren. La unua etaĝo estas samtempe teretaĝo. Simile ni kalkulu etaĝojn subter(en)o. La unua subtera etaĝo estas tiu plej proksima al la tersurfaco apud la domo. Iuj domoj ja havas kelkajn subterajn etaĝojn.

Kiel esprimi la ĉeĥlingvajn „*poschodí*“ kaj „*patro*“? Ili senpere ne kontaktas la teron, ilin ni atingas helpe de ŝtuparo (aŭ lifto), pro tio en la ĉeĥa ni diras „*Do poschodí jdeme po schodech*“. Esperante ni povas tiun etaĝon nomi „ŝtupara etaĝo“ aŭ koncize „ŝtupetaĝo“. Same la germana „*Stock*“ estas ŝtupetaĝo.

Koncerne al la aŭtoroj de PIV kaj NPIV mi esprimas gravan bedaŭron pro ilia mistifiko kaj needuko de adeptoj de Esperanto. Male, laŭdon meritas la aŭtoro de la ĉeĥesperanta vortaro, Karel Kraft, kiu en la kapvorto ***poschodí*** instruas: (ŝtupara) etaĝo, ***první*** ~ (= *druhé podlaží*) dua etaĝo, *vlivem národního jazyka někde nevhodně* (influe de nacilingvo ie nekonvene) unua etaĝo.

Mi do fermas: La urbodomo de Olomouc estas trietaĝa edificio (*budova*). Kiam vi venos al la urbo, mem konvinkiĝu pri tio.

J. Werner

Kvakeraj Esperantistoj kunvenos en Ĉeĥio

La Kvakeroj aŭ anoj de la Religia Societo de Geamikoj, spirita grupo fondita de Georgo Fox kaj aliuloj en la 17-a jarcenta Anglio, havas la propran fakgrupon en Esperantujo. Ĝi nomiĝas la Kvakera Esperantista Societo (KES) kaj ĝi jam havas kelk-jardekan historion. Membroj de la grupo renkontiĝos inter la 28-a de aprilo kaj la 1-a de majo en Ĉeĥio okaze de la Mezeŭropa Kvakera Kunveno en Český Šternberk. Kvakeroj famiĝas pro pacela laboro, kaj ilia centra doktrino estas la kredo je rekte alirebla Dia ĉeesto, "la Interna Lumo", en ĉiu homo. Kvakerismo emfazas samtempe mistikan kaj sociale ageman spiritan vojon. KES nun spertas renaskon de intereso kaj forto kaj pro tio nun deziras plani reorganizon por pli bone servi la bezonojn de Esperantistoj kaj Kvakeroj en la 21-a jarcento.

Pavel Marušinec

pavel.marusinec@cuzk.cz

Ĉilia Esperanto-Asocio

<http://www.esperanto.cl> renovigis sian retejon, kiu proponas novaĵojn ne nur el la Amerika kontinento. Ĝi disponigas ligojn ankaŭ al ĉiuj naciaj kaj fakaj organizoj kaj multajn artikolojn.

Andrea Bocelli en la Honora Komitato

La fama kantisto Andrea Bocelli akceptis eniri la Honoran Komitaton de la 91-a Universala Kongreso kiu okazos en Florenco ekde la 29-a de julio ĝis 5-a de aŭgusto 2006.

Andrea Bocelli aldoniĝas al multaj aliaj eminentuloj, el kiuj aparte menciindas la iama Prezidento de Itala Respubliko Francesco Cossiga kaj la verkisto kaj lingvisto, iama Ministro pri Instruado, Tullio De Mauro.

La 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio

okazos en la slovena Maribor en la tagoj ekde la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007 (jes, post unu jaro). Programon kun biologiaj kaj ekologiaj temoj oni trovas ĉe la Maribora retejo <http://www.esperanto-maribor.si>.

Esperanto en Afriko

Pri la afrika movado informas retejoj:
<http://afriko.org/>
<http://takelaka.dts.mg/uks/page6.html>
http://www.esperanto.za.org/eo/index_eo.html



Rabatoj por Lančov 2006

Por la ĉijaraj etapoj en la tendaro ĝuas rabaton membroj de la Junularo SET Lančov, kiuj povas ricevi ankoraŭ pluajn rabatojn por ĉiu nove varbita tendarano aŭ por venigo de sia klaso por tranokti en la tendaro dum ekskurso. Kiu volus varbi por la tendaro en lernejoj de sia regiono, povas ricevi materialojn ĉe Esperanto Třebíč, Esperantistů 3, 674 01 Třebíč, tel. 568 841 909, rete ĉe podhradska@volny.cz.



La tendaron propagandas propra domajno www.set-lancov.cz, sed ankaŭ la regiono Vysočina www.tabory-vysocina.cz/cz/letni-tabory/ kaj la retejo de nia junularo, kie eblas akiri informojn pri la kondiĉoj por akiri la rabatojn. Iru al la paĝo <http://esperanto.blahus.cz/cxej/iru.php?> kaj elektu *Oběžník I*. Babilemuloj povas tendare diskuti ĉe <http://kluby.quick.cz/klub.aspx?kllD=6955>.

WIM JANSEN REPREZENTOS UEA ĈE EŬROPA LINGVA KONSILIO

La Estraro de UEA elektis s-ron Wim Jansen, docenton pri interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo, kiel konstantan reprezentanton de UEA ĉe la Eŭropa Lingva Konsilio, kies fonda membro UEA estas. Wim Jansen lastatempe partoprenis asembleon de ELK en Bruselo nome de UEA (vd. Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 224).

Lingvaj ludoj

Se vi ŝatas lingvajn ludojn, vi povas plurajn trovi ĉe la junulara paĝo <http://esperanto.blahus.cz/cxxej/iru.php?> sub *Jazykové hry*. Tie vi trovos ligojn al **Skrablo**, ludo por du ludantoj, kiu evoluigas la vortan inventemon de la skrablantoj. Ĝi estas hibrido inter domeno kaj krucvorta enigmo. La ludo ekzistas en multaj lingvoj kaj havas siajn organizojn.

Ligo al **Homo ludens** proponas plurajn esperantlingvajn ludojn kaj ŝercojn.

Por infanoj estos certe plej interesa **Babili Esperante**, parto de la reta kurso Lernu!, plena de moviĝantaj bestetoj.

Ni kondolencas

La 24-an de decembro 2005 forpasis **Augustin Chlum** el Liberec (*1928), esperantisto ekde 1946, multjara kasisto de EK Liberec, kontribuanto al la ĉeĥlingva gazetaro, membro de Skolta Esperantista Ligo.

La 7-an de januaro 2006 en Prago forpasis **Eva Řiháčková** en aĝo de 74 jaroj, kiu en junaĝo tre laboris por Esperanto, ekz. en la teatro „Verda ĉaro de Julio Baghy“ (s-ino Higgins en Pigmaliono). Multaj memoras ŝin el nia UK 96 antaŭ dek jaroj.

La 24-an de februaro 2006 mortis **Josef Václav Otta** (70-jara), fondinto de la rondeto en Šumperk.

FRANS MAKKINK

(1907-2006)

Gerrit Francois (Frans) Makkink forpasis la 5-an de januaro 2006 en Wageningen, Nederlando. Li kunfondis la nederlandan sekcion de Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj ekde 1949 estis kelkajn jarojn kunredaktoro de "Scienca Revuo". Li verkis multajn studojn pri la lingva problemo en scienco kaj pri esperantologiaj temoj, i.a. "La participoj en Esperanto" (1967), "La problemo de komunikado en la mondo" (1971), "Pri la artikolo en Esperanto" (1987) kaj "Nia Fundamento sub lupeo" (1990). Li okupiĝis ankaŭ pri esperantigo de poezio kaj grave kontribuis al "Nederlanda Antologio" (1987).

Kiel honora membro de UEA li estis elektita en 1988.

POUL THORSEN

(1915-2006)

La 30-an de januaro forpasis la dana Esperanto-poeto Poul Thorsen en la aĝo de 91 jaroj. Thorsen, kiu profesie estis instruisto, lernis Esperanton en 1931 kaj jam baldaŭ ekaktivis en la laborista Esperanto-movado.

En la 50-aj jaroj Thorsen gajnis plurajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA. De 1954 ĝis 1962 li gvidis la eldonejon "Koko" kaj estis kunredaktoro de la altnivela kultura-literatura revuo "Norda Prismo" de 1957 ĝis 1974. Liaj ĉefaj eldonitaj verkoj, kiujn ofte karakterizas satira humuro, estas la poemaroj "Rozoj kaj urtikoj" (1954), "Sen paraŝuto" (1963), "Gruk" (de Kumbel, 1956), "Pluk: miniaturoj" (1960); "Du el" (kun Marjorie Boulton, 1985), la rakontaro "Stokita vino" (1995), kaj la rememoroj "Babile kun mi mem" (1996).

Grandaj hobiaj de Poul Thorsen estis, kiel li mem diris, "ekscesa vojaĝemo" - li vizitis pli ol 80 landojn - kaj fungoj, pri kiuj li longe ankaŭ estis fakdelegito de UEA.

En 1997 li kaj lia edzino Roma donacis al UEA grandan monsumon por starigi la kason Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kiu intertempe helpis kelkdekon da Esperantobibliotekoj por pliriĉigi siajn kolektojn (ĉe ni ekz. en Brno).

Gazetaraj informoj de UEA

ESPERANTO EN DOBŘICHOVICE 2006

Dobřichovice estas malgranda komunumo (3000 enloĝantoj) apud Prago, rande de Bohemia Karsto. Ĉiuj pli sube menciitaj aranĝoj (krom la Ekumena Diservo) okazos en la pensiono Sokol, al plejparto de esperantistoj jam bone konata. Laŭ la interkonsento inter la organizanto kaj koncernaj asocioj, membroj de ĈEA kaj SKEF povas ĝui rabaton, sed atentu, ke nur aliĝante en la 1-a aliĝperiodo. Jen la unuopaj ĉi-jaraj aranĝoj:

EKOTUR (1.-8.7.): Dum la ekoturisma renkontiĝo oni disdividiĝos dumtage al du grupoj: biciklistoj kaj piedturistoj. Dum unu tago estas planata por eventualaj interesatoj boatado sur la rivero Berounka el Beroun al Dobřichovice, por tiuj, kiuj ne konas Pragon ankaŭ unutaga promeno tra Prago kun esperantlingva ĉiĉerono. Vesperaj programoj estos komunaj: eduka (prelegoj kaj diskuto pri ekoturismo, ekologio kaj Esperanto, lingvaj kvizoj) kaj amuza (kantado, dancado, ktp.), depende de la interesoj de partoprenantoj. Se ĉeestos komencantoj, eblas ankaŭ kurso (ĝi estis tre sukcesa dum Ekotur en Kvilda).

InPaSem (Internacia Paroliga Semajno, (2.-8.10.). Tradicia aranĝo, al kiu impulson donis francaj fervojistoj, kiuj ankaŭ tradicie venadas plej amase. Laŭ la nombro de aliĝintoj ili estos disdividitaj al minimume 2 grupoj (kurso por komencintoj, kiujn instruas per Ĉe-metodo Stano Marček, kaj seminario por jamaj parolantoj). Kaze de pli da partoprenantoj eblas havi pli da seminari-grupoj, gvidataj de spertaj esperantistoj.

Ĉiutage oni lernas 4 horojn, dum la ceteran tempon oni dediĉas laŭplaĉe al gvidata turismo (plejparte, sed ne nur en Prago), liberaj aktivecoj, amuziĝo. Vendrede posttagmeze estos tradicia renkontiĝo de la partoprenantoj de InPaSem kun la lokaj esperantistoj, kiun sekvas por interesatoj Ekumena Diservo (rig. pli suben), por la ceteraj promeno tra Dobřichovice.

Internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA (6.-8.10.). Ili paralelas kun InPaSem, ke povu aliĝi ankaŭ "inpasemanoj", sed temas pri memstara aranĝo, do eblas ĝin partopreni sen aliĝo al InPaSem.

Ekumena Diservo en Esperanto (6.10. malfruposttagmeze, kungvidos ĝin katolika, husana kaj evangelia pastroj). Ankaŭ sendependa aranĝo malfermita al ĉiuj esperantistoj (kaj ankaŭ neesperantistoj).

KAEST (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, 10.-12.11.). Tradicia renkontiĝo de fakuloj pri diversaj fakoj kaj de Esperanto-terminologoj. Post ĝi tradicie aperos Prelegkolekto, en kiu ĉiun prelegon en Esperanto sekvas resumoj en la angla, la germana kaj la ĉeĥa lingvoj. Ĉijare la temo A (ĉeftemo) estas LINGVO KAJ INTERRETO, la temo B: STUDIOJ EL DIVERSAJ FAKOJ.

Pliajn informojn kaj aliĝilojn vi trovos sur la retpaĝo www.kava-pech.cz/ekotur, www.kava-pech.cz/inpasem respektive www.kava-pech.cz/kaest, aŭ skribu al Petro Chrdle, Anglická 878, 25229 Dobřichovice kaj vi ricevos ilin en papera formo.

Petro Chrdle

KALENDARO 2006

18-23. 4. 2006 Semajna Lingva Seminario en Skokovy. Pliaj informoj www.mlboleslav.cz/esperanto aŭ drahotovaesperanto@seznam.cz

21.-23.4. 2006 Adonido - Hkaváček Ratiškovice melicharkova@quick.cz

15.-18.6.2006 TREP Plasy kaj ELFO esperantoplzen@centrum.cz

1.-8.7. 2006 Ekoturisma Seminario (EKOTUR 2006) en la urbeto Dobřichovice apud Prago Informoj: www.kava-pech.cz/ekotur

8.-15. 7. 2006 La 59-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) en la grava pilgrimloko Velehrad (suda Moravio). Specialan programon por junuloj organizos ĈEJ. Informoj: www.ikue.org aŭ <http://mujweb.cz/Spolecnost/Svacek>, pri la junulara programo ikue@blahus.cz

2.7. – 15.7. 2006 La 1-a etapo SET Lančov (podhradaska@volny.cz)

16.7. – 29.7. 2006 La 2-a etapo

30.7. – 12.8. 2006 La 3-a etapo

12.8. – 13.8. 2006 Renkontiĝo de eksaj tendaranoj en SET Lančov

12.-19. 8. 2006 La 56-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) en la vilaĝo Strážné (la montaro Karkonoŝo, nord-orienta Bohemio). Informoj: cea.polnický@quick.cz

15.-29. 6. 2006 La 28-a Renkontiĝo de Esperantaj Familioj (REF) en Pilský Mlýn. Informoj: PavlaDvorakova@tiscali.cz

22.-24.9.2006 Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, České Budějovice jirka.tomecek@post.cz

2.-8. 10. 2006 Internacia Paroliga Semajno (InPaSem) 2006 en la urbeto Dobřichovice (proksime de Prago), en la pensiono Sokol. Informoj kaj aliĝiloj: www.kava-pech.cz/inpasem

6.-8. 10. 2006 Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI en Dobřichovice (la lastajn 3 tagojn de InPaSem 2006).

16-22. 10. 2006 Semajna Lingva Seminario en Skokovy. Pliaj informoj www.mlboleslav.cz/esperanto aŭ drahotovaesperanto@seznam.cz

29.9.-1.10. La 18-a Internacia Kultura Festivalo (IKF 2006) en Ústí nad Labem omaĝe al 100-jariĝo de Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr. Informoj: Miroslav Smyčka, Dlouhá 20, 370 11 České Budějovice aŭ

vlastimil.novobilsky@atlas.cz aŭ kriz.j@kr-ustecky.cz.

10.-12. 11. 2006 Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) 2006 en la urbeto Dobřichovice (proksime de Prago) en la pensiono Sokol. La temo A(ĉefa) estas: Lingvo kaj Interreto, la temo B: Studoj el diversaj fakoj. Informoj: www.kava-pech.cz/kaest

9.12. 2006 La 27-a Ĉeĥa-Saksa Tago, informoj: Miroslav Smyčka, Dlouhá 20, 370 11 České Budějovice aŭ vlastimil.novobilsky@atlas.cz aŭ kriz.j@kr-ustecky.cz.

Na této stránce zveřejňujeme esperantské akce pořádané u nás. Přehled umožňuje vybrat si z nabídky podle svých zájmů a možností, případně zvolit volný termín pro akce nové. Je i ve vašem zájmu včas nahlásit, co připravujete.

**TOTO číslo Starta je
poslední, které dostanete,
pokud nemáte zaplacen svůj
členský příspěvek na rok
2006!!!**

Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte tiskopis VKLAD, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 kolonek - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte svoje číslo legitimace a pošlete tajemníkovi seznam, za koho platíte. **Symbol konstantní** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku. **Na starý účet u KB již nic neplatíte!!!**

Seznam čísel (variabilní symboly):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES
- 06944** zápisné do Odborné knihovny ČES
- 07001** předpl. *Monato* (650,- Kč)
- 07002** předpl. *La Gazeto* (650,- Kč)
- 07003** předpl. *La Ondo de Esp-o* (500,- Kč)
- 07004** předpl. *Juna Amiko* (300,- Kč)
- 07005** předpl. *Literatura Foiro* (970,- Kč)
- 07006** předpl. *Heroldo de Esp-o* (1030,- Kč)
- 07007** předpl. *Femina* (650,- Kč)
- 07008** předpl. *Litova Stelo* (320,- Kč)
- 50200** sekce železničářů IFEF
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí

- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI
- 51100** sekce katol. esp. IKUE
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

Zájemci o časopisy,

pište na adresu peranta: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz. Způsob placení najdete v levém sloupci této strany.

Monato: 650,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4

La Gazeto: 650,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 500,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4

Juna Amiko: 300,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5

Litova Stelo: 320,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

Literatura Foiro: 970,- Kč, v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5

Heroldo de Esperanto: 1030,- Kč, v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A3

Femina: 650,- Kč, v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

Periodikum Ĉeského esperantského svazu (37. ročník)

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

malovec@volny.cz;

http://members.chello.cz/malovec/

Ĉlenská evidence a změny adres:

**c/o Pavel Polnický, ĈES, Na Vinici
110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325
615 651, cea.polnický@quick.cz**

Uzávěrka dalšího čísla: 7.5.2006

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
(37-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

Abonprezo: 10 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, e-mail: malovec@volny.cz;**

http://members.chello.cz/malovec/

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
7.5.2006**

ISSN 1212-009X

En la ĉeĥlingva versio de la gazeto Computer aperis laŭdo (subskribita -rp) alte aprezanta la ekzercaron:

***Ideo.** La paĝoj servas kiel elektronika ekzercaro de la libro Esperantem za tři měsíce. La retejo estas do valoro aldonita al la libro, kiun la interesato devas aĉeti. La laŭdindan sintenon al la klientoj certe povus sekvi ankaŭ aliaj eldonejoj de faka lingva literaturo.*

***Enhavo.** En la enkonduka paĝo vi trovos informojn pri la celoj de la retejo kaj ankaŭ koncizan prezenton de la artefarita lingvo Esperanto. Utilaj estas bildoj en tiu parto de la retejo, kien neregistrita uzanto ne povas eniri.*

***Strukturo.** Dezajno de la retejo estas tre agrabla kaj relative perfekta, tamen troveblas detaloj, kiujn valorus finverki.*

Sekvas kelkaj konsiloj, kiujn la aŭtoro jam obeis, do la mankoj malaperis.

La libro mem havas tute novan legaĵon sur la lastaj 45 paĝoj.

Ekzercaro al la 3-a eldono

Ekzercaron al la ĵus aperinta tria eldono de lernolibro *Esperantem za tři měsíce* kreis studento Petr Melichárek ĉe adreso <http://esperanto.xhosting.cz/>. Ĝi estas inter-aktiva, uzebla nur en komputilo.